



Kulturaj Kajeroj

É. MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

JARABONO :

Simpla : 3 fkoj Sendotaj al : Micard Henri
Subtena : 5 fkoj Kulturaj kajeroj
Bonfara : 10 fkoj Epineux-le-Seguain (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pagò 4)

NOVEMBRO - DECEMBRO

1960

6

KULTURAJ KAJEROJ

1960

Novembro - Decembro

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

René Watier
Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

Promesis kunlabori en 1960 :

William Auld (Britujo)
Julio Baghy (Hungarujo)
Delfi Dalmay (Hispanujo)
Alberto Barrocas (Urugvajo)
Hannes Koivu (Finnlando)
Robert Martin (Francujo)
Eugeniuzs Matkowski (Pollando)
William Perrenoud (Svislando)
M. de Waard (Nederlando)
kaj aliaj diverslandaj elstaraj esperantistoj.

ENHAVO

S-ro Belhoste skribis por vi :

Nepre ni konservu la simplecon de Esperanto.
Esperanto tra la mondo.

TURISMO :

Legendoj el Bretonio (S-ino Potin).

La ekonomia vivo de la Princlando Monako

(S-ro Progetti - Trad. S-ro J. Derks).

EL IE EN LA MONDO :

Kibuco, kooperativa vilaĝo en Israelo (Ota Ginz).

La Urugvajanoj kaj la futbalo.

Sub la granda kverko.

Tra la Esperanta literaturo : A. Kofman.

Fantaziaĵoj : Mahlzeit kaj Zaturek — (Karinthy-
Trad. Oro. I. Nagy).

Por via distro — Nia Konkurso.

La Junaj Detektivoj (5-a parto) — J.H. Sullivan.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spugulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

KONSTERNA INFORMO

Tre kortuŝis la tutan esperantistaron la subita forpaso de Profesoro Doktoro Giorgio CANUTO, Prezidanto de U.E.A.

La administrantaro de la Esperantista Kulturdomo, kiu antaŭ du monatoj ricevis kuraĝigojn de Dro Canuto, kaj la redakcio de « Kulturaj Kajeroj » esprimas sian kondolenccon al Sinjorino Canuto kaj ŝia filo.

S-ro Belhoste skribis por vi

Nepre ni konservu la simplecon de Esperanto

Ekde 1887, la Esperantistoj opiniis, ke la simpleco kaj do la facila lernebleco de la lingvo de D-ro Esperanto estas unu el la plej bonaj argumentoj por nio afero, kaj tiu simpleco rilatis ne nur la gramatikon sed ankaŭ, se ne ĉefe la radikaron.

Zamenhof mem en sia « Unua libro de la lingvo Esp. Fundamenta Krestomatio » (Hachette 1903 p. 246-247) skribis :

« Mi kreis regulojn por vortfarado kaj per tio ĉi mi enportas grandegan ekonomion rilate la nombron de la vortoj ellernotaj, ne sole ne deprenante per tio ĉi de la lingvo ĝian riĉecon, sed kontraŭe farante la lingvon... pli riĉa el la plej riĉaj naturaj lingvoj... »

Dank'al la supre montritaj reguloj kaj ankoraŭ al kelkaj flankoj de la lingvo, pri kiuj mi trovas superflue kie ĉi detale paroli, la lingvo fariĝas eksterordinare facila kaj la tuta laboro de ĝia ellernado konsistas nur en la ellernado de tre malgranda nombro de vortoj... »

Cu ni zorgeme konservis tiun simplecon ?

Laŭ la Zamenhofaj konsiloj, kiam oni iras « descendas » ; kiam oni skribas sian nomon sub la finaĵo de letero, verko, ktp, oni subskribas ĝin — nun oni « signaturas » ; io estas malofa ? — nun ĝi estas « rara » — ĝi estas mallonga ? — ne, ĝi estas « kurta » — oni klarigas ion ? — ne, oni ĝin « eksplikas » ktp... kaj nun en niaj vortaroj, tro ofte ni vidas vortojn kun la signo = montranta al samsignifa vorto.

Ja oni povos argumenti ke malsupreniri, subskribi, malofa, klarigi ktp., estas pli ĝuste difinoj de la objekto, ago, eco... kiun oni volas nomi ol iliaj vere specialaj nomoj. Sed ĉu, ĝuste, en tio mem ne kuŝas la simpleco de la radikaro, la facila lernebleco de la vortaro el kiu, prave tiam, Zamenhof tiris unu el siaj plej konvinkaj argumentoj favore al Esperanto ?

Oni facile kontraŭbatalas mian argumenton montrante, ke niaj naciaj malnovaj lingvoj entenas multajn vortojn kiuj estas esprimeblaj per pluraj samsignifaj radikoj kaj ke, se ne ĉefe, almenaŭ parte pro tio, oni nomas ilin riĉaj.

Mi ankaŭ konscias ke, kiam el simpla radiko oni tiam volis eltiri la nomon de multaj samsignifaj objektoj oni ofte renkontis malprecizecon = Ni havis ja ĉe la komenco « pafi » el kiu ni eltiris « pafilo, pafileto, pafilego ».

Normala, kaj de Zamenhof mem dezirita evoluado de la lingvo, alportis pli precizajn vortojn por nomi vere malsamajn pafilojn = kanono, fusilo, karabeno, pistolo, revolvero, ktp.

Tian riĉigon, bone ! sed tiun, kiu por tute sama, mema vorto prezentas aliajn tradukojn, ne ! Ni nepre devas ĝin forjeti.

Kial ? kial do Esperanto ne same kiel la malnovaj naciaj lingvoj ne riĉiĝus per alprenado de multaj samsignifaj vortoj ?

Mi opinias, ke tiun riĉecon ni devas nun forrefuzi.

Al ĝi ni devas nepre preferi la simplecon, la facilan lerneblecon de la lingvo. La verkistoj niaj dank'al kiuj Esperanta literaturo ĉiam pli graviĝas devus uzi ĉiam la plej simplajn formojn kaj radikojn kaj ne krei malutilajn novajn vortojn (pereiga balasto por Esperanto).

Ni, ordinare neverkemaj esperantistoj, same nepre devas refuzi tiujn bedaŭre oftajn novaĵojn kaj neniam mem uzi ilin.

Ni ja ne devas forgesi ke Esperanto ve ! ne jam estas oficiale enkondukita en la lernejojn de ĉiuj nacioj aŭ almenaŭ de la plej gravaj ; ni estas ankoraŭ en la propaganda periodo dum kiu :

Ni semas kaj semas neniam laciĝas

kaj tamen eĉ agente plej prudente, ni devas konstati ke plej ofte

Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas...

Ni memoru ke krom Eŭropo (tamen ĉu ne ? ne sufiĉe kontentige varbita !) ekzistas ankoraŭ pluraj cent milionoj da homoj kiujn ni devos varbi. Tiuj homoj, kies, skribmaniero, literaro ĝenerale tute malsimilas la esperantajn, ne komprenos ke, plie, ili devas lerni plurajn samsignifajn vortojn, ke specialan vortaron oni devas

Esperanto tra la Mondo



KIEN VI IROS EN 1961?

— La 46a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Harrogate (Britujo), (5-12 aŭgusto), estos samtempe arta festivalo. Lordo Boyd Orr, Nobel pacpremito estos la alta protektanto de la U. K.

— Antaŭaj manifestacioj :

En Londono, de la 2a ĝis la 4a de aŭgusto, elektu inter « antaŭkongreso » kaj seminario « Oriento-Okcidento ». Petu informojn al : Londona Esperanto Klubo, Fred Tallant Hall, 153, Drummond Street, London N.W.I.

— Por la ĝejnuloj, kongreso de T.E.J.O. en Wokingham, la semajnon antaŭ Harrogate. Petu informojn al : S-ro H.R. Tonkin, St. John's College, Cambridge, Anglujo.

— Nacia kongreso de U.E.F., en Epernay, dum Pentekosto (20a, 21a, 22a de Majo).

— Kongreso de SAT-amikaro, dum Pasko, en Limoges.

— Internacia kongreso de SAT 1961 en Gent (Belgujo).

— Projekto de feria restado en Domfront (Orne), Francujo, 14-21 aŭgusto, kun interesaj ekskursoj. Skribu al -Sro G. Veron, Esperanto, Domfront.

studi se oni volas kompreni(?) multajn nunajn poemojn, kiuj sen tio restos rebuso, ke oni ne konservis la simplecon de la Zamenhofaj versfarado kaj proza stilo.

Tial ni devas tre atenti ankaŭ ke Esperanto ne havu vortaron por la latindevenaj lingvoj, alian por la anglo-germanaj ktp. sed restu vere internacia.

Resume Esperanto estu ĉiam la « lingvo de la popolo » kaj ne fariĝu la internacia lingvo nur por tre kleraj personoj.

Tion skribinte mi tre bone scias ke mi ne ricevos nur aprobojn !... ja, kvankam — aŭ eble ĉar — mi estas esperantisto de januaro 1908 mi povas erare argumenti favore al tiu opinio mia !... se mi eraras... des pli bone ! Mi tion dezirus por la bono de nia lingvo, ĉar tio pruvus ke mia nuna timo estas vere senkaŭza !

— Internacia Kongreso de fervojistaj esperantistoj, en Barcelono (7-11 Majo).

NASKIĜO DE J.E.F.O. (Junulara Esperantista franca Organizo). — Francaj ĝejnuloj interesataj, skribu al la Prezidanto-Sekretario : Michel Turin, 43, rue Emile-Magnin, Pontarlier (Doubs).

Perantino por la estonta Internacia TEJO-Kongreso : F-ino Nicole Blanc, Laboratoire departemental, 2, rue Charles-Roy, Nevers (Nievre).

ESPERANTISTA AGADO EN POPOLUNIVERSITATOJ. — Esperantistoj de pluraj landoj havis gravan aktivecon dum la 3a Internacia Konferenco de la Popoluniversitatoj, en Strasburgo (9-11an de Septembro 1960).

ĈU VI MEMORAS... — ... ke U.E.A., kontraŭ 4 int. respondokuponoj, povas sendi 12 belegajn fotoafisojn de UNESKO, kun esperanto-teksto.

... ke kontraŭ la valoro de 2 steloj por unu ekzemplero, U.E.A. povas liveri al vi « Courrier de U.N.E.S.C.O. » (en angla, franca, hispana aŭ rusa lingvo) de decembro 1959, kun granda artikolo pri Zamenhof.

... ke U.E.A. eldonis « La Memorlibro pri la Zamenhof-jaro ».

BULGARUJO. — Oni esperas inaŭguri en aŭgusto, montodomon, je alteco super la maro de 1.350 m., sur monto Vitoŝa, apud Sofio.

HUNGARUJO. — Kursoj de esperanto okazas en la kolegioj de Gyula, Oroshaza, Szeged.

DANLANDO. — La dana ministro por internaj aferoj (esperantisto) faris radio-prelegon pri : « Esperanto-la solvo de la interpopola lingvoproblemo ».

GRAVA RADIODISSENDI PRI ZAMENHOF. — La 13 an de novembro, je la 21a, duonhora dissendo pri la vivo de Zamenhof okazis en Radio Luksemburgo, en Radio Andorre kaj Radio Monte-Carlo. La dissendo okazis en kadro de serio titolita : « La famaj nekonatuloj ».

ESPERANTA AGADO LIGITA KUN LA UNESKO-PROGRAMO. — En ligo kun la ĉefprojekto de UNESKO pri kultura rilato inter Okcidento kaj Oriento, la esperanta grupo de Angers (Francujo) organizas serion de vesperoj pri aziaj popoloj, kun la helpo de eksterlandaj esperantistoj kaj de oficialaj servoj por la ricevo de materialo. Jam okazis vesperoj pri Uzbekistan, Ĉinio, Ĉiganoj. Aliaj estas preparitaj, notinde pri Israelo kaj juda popolo, Hindujo, Japanio, ktp.

SUB LA GRANDA KVERKO

El letero de vizitinto



« Intencante, per motorciklo, veturi de Parizo ĝis Royan, mi decidis tranokti en « Kastelo Gresillon » pri kiu mi ion legis hazarde en la gazeto .

Do, ian jaŭdon vespere, komence de aŭgusto, mi alveturis Gresijonon. Afable akceptata, certe, sed tamen, neniun konante, la kuriozemuĉulo, kiu mi estis, time aŭskultis esperante kaj poroletis francelingve.

Vendrede, la duan tagon je la deka horo, la tuta tendilaro bone pakita, tutpreta je foriro, la motorciklo min atendis antaŭ la kastelo.

Sub suno ekbrilanta, mi partoprenis naĝadon, poste, iom ludis kaj, ĉar estis tempo, mi tagmanĝis en la kastela manĝo ĉambro. Mi estis decidanta foriri tuj post tagmanĝado.

Sed... sed teruraj estas la gresijonanoj !

Post kafinvidado, estis ludinvidado ; poste denove naĝadon. La kuriozemulo iom pli parolis kaj je la 6a vespere, remuntis la tendon...


Sabaton... Dimanĉon... mi daŭrigis mian ĉerestadon.

London, mi ekkursis ; mi partoprenis la kurson, sed ne intencante ĉeesti ĝis la fino de la provtempo.

... Kaj tamen, post pli ol tri semajnoj, mi bedaŭrante foriris, post fino de tiu provtempo.

Nun, hejme, ofte mi songas pri tiu agrabla tempo : mi tralegas kaj relegas la « Kulturaj Kajerojn », kiuj multe plaĉas al mi, ĉar tre diversaj kaj interesaj estas ĝiaj artikoloj : gramatikaj respondoj, tra Esperanta literaturo. Por via distro, Turismo en Francio, ktp. Mi ankaŭ iom legas kaj lernas niajn kantojn el mia manskribita kantaro.

Kun plezuro mi ricevis leterojn de geamikoj kaj konservas bonegan memoradon de ĉiuj, ĉu instruistoj, ĉu gelernantoj, ĉu junaj... ĉu... mi



estis skribonta malplijunaj, sed nur estis junaj, eĉ ia « kvindekunuŭlino » inter la plej junaj, kaj certe la plej babilema... eĉ pli ol mi. »

Pierre FRIEDLANDER.

« Nautilus ».

Legendoj el Bretonio

La Bretona animo ĉiam kliniĝis al revoj, fantazieĝaĵoj, supernoturaĵoj ; tio komprenigas la mirindan abundecon kaj la persistecon de legendoj en Armora lando.

LA RONDA TABLO. — Post Kristmorto, Joseph d'Armathie, unu el liaj disĉiploj, forlasis Palestinujon, forportante kelkajn gutojn el Dia sango, en la kaliko el kiu la Savinto trinkis, dum la lasta Sankta Manĝo.

Li elŝipiĝis en Bretonio, restadis en Brocelianda arbarego (nuntempe nomata Arbaro de Paimpont) ; tiam li malaperis sen lasi ian ajn postsignon ; la trezora Kaliko estis perdita...

En la sesa Jarcento, Reĝo Arturo kaj kvindek kavaliroj organizis entreprenon por retrovi ĝin. Je ili, ĝi konsistigis la Sanktan Gralon, ke nur militanto kun pura koro povos konkeri.

Perceval (la Persifalo de Wagnero) estas ties tipo. Esplorado pri la Gralo naskis, en la mezepoko, neelĉerpeblajn rakontojn, kiuj formas la ciklon de la Ronda Tablo. (Arturo kaj liaj kavaliroj kunvenis sidante ĉirkaŭ ronda tablo, porforigi iun ajn superrangecon).

MERLINO KAJ VIVIAN. — Unu el la kunuloj de Reĝo Arturo, Merlino la sorĉisto, venis al Brocelianda arbarego por vivi tie, en retiriĝo, sed li hazarde renkontis Vivian. Amo ekzaltis la sorĉiston kaj la feino ! Por pli certe gardi Merlinon por ŝi mem, Vivian enfermis lin en magia cirklo. Estus ludo por la sorĉisto sin liberigi, tamen ĝoĝe, kaj por eterneco, li konsentis pri tiu aminspirita malliberigo.

TRISTAN KAJ ISEULT. — Tristan, Princo de la Lando Leon, sendita de sia onklo Marko, Reĝo de Cornouailles, revenis el Irlando kun Iseult kiel edzino por la Reĝo Marko. Dum la ŝipveturado, Tristan kaj Iseult erare trinkis la sorĉan amigilon destinata al realigo de konstantega unueco inter Iseult kaj ŝia edzo. Pasio ekflamis iliajn korojn pli forte ol devo.

La rakontoj variigas konkludojn : iafoje Tristan estas mortigita de la Reĝo Marko, ofende dolorigita de lia perfido ; iafoje li edziĝas kaj mortas en sia kastelo en Bretonio. Tamen Iseult, senŝange, sekvas lin en tombon.

La Wagnera Opero, kaj la libro de Joseph Bedier, famigas tiun dramon de amo instigita.

LA URBO « IS ». — En la tempo de la bona Reĝo Gradlon, proksimume je la sesa jarcento, « Is » estis ĉefurbo de Cornouailles : la « Golfo de la Mortintoj », de Douarnenez, la urbeto Penmarch', depostulas ties postsignojn. Ĝi estis tiel bela, ke laŭ la Bretona tradicio la loĝantoj de Lutĝce, serĉante nomon por sia fiera civito, estus elektinta « PAR-IS » (pareille à « Is », same kiel « Is »).

La urbo Is estis protektita kontraŭ la maro per digo. La Reĝo Gradlon ĉiam gardis ĉe si mem la ŝlosilon, kiu malfermis la kluzojn. Lia diboĉema filino, la bela Dahut (iafoje nomata Ahès) okaze renkontis la Diablon, sub la formo de alloga junulo. Li petis ŝin, kiel pruvon de ŝia amo, malfermi la pordojn por la ondegoj. Dahut ŝtelis la ŝlosilon dum la dormado de la Reĝo. Baldaŭ la maro impetegis en la urbon.

Gradlon fuĝis rajdante ĉevalon, kun sia filino, postsele. Sed la ondoj postkuris kaj tuj englutis ilin... En tiu momento, voĉo el la ĉielo ordonis al la Reĝo feti la diablinon for de la selo, se li dezirus esti savata. Obéis la kompatinda patro, sed sangadis lia koro !

La ondoj tuj retiriĝis ; tamen la urbo Is estis tute detruita.

Gradlon elektis Quimper kiel ĉefurbon, tiu kjaligas ke lia statuo staras inter la du sonorilturoj de la katedralo. Li vivis sankte dum siaj lastaj tagoj, gvidata kaj subtenata de Sankta Corentin.

Dahut, metamorfozita en sirenon, de tiam altiras ĝis la fundo de la maro la maristojn, de ŝia beleco allogitajn.

LEGENDO DE LA LAGO DEGRANDLIEU. (el Oraj Uleksoj, Majo 1955). — La lago kuŝas ne malproksime de la urbo Nantes, sur la maldekstra bordo de la riverego Loire. Estas vera « Ranlando » ! Promenantoj alvenas ĝis bonekonata restoracio por manĝi ilin...

Stranga estas tiu akvospatco, eble la plej vasta en Francio, kun ĝiaj sesdek kvadrataj kilometroj, sed ĝi povas esti pli aŭ malpli ampleksa. Tio dependas de la vetero, de la abundeco de la tributo kiun alverŝas en ĝin la du ĉefaj riveroj Bulonjo kaj Onjo, kaj de la kvanto de akvo kiun elfluigas la tria rivero Aŝno, kiu forportas la akvon al la maro.



La Strando Ris, en la golfeto Douarnenez, kie laŭ la legendo situis la urbo Is
(Kliŝo Comité Départemental du Tourisme, Quimper).

La lago ne estas pli profunda ol 2 aŭ 3 metrojn.

Laŭ legendo, tie ekzistis, ĝis la mezo de la sesa jarcento, bela urbo nomita Herboj, kies enloĝantoj estis jam idolanoj. Du predikantoj, du sanktuloj : Felikso kaj Marteno venis por konverti ilin al la kristana religio.

Ho ! Ve. Ili renkontis nur mokridojn, insultojn ; ĉiusecajn malbonaĵojn. Ili tute ne sukcesis !

Venĝe Dio abismigis la malvirterman urbon kun ĝia tuta loĝantaro. Jen, kiel aldiras la sama legendo, oni povas aŭdi dum grandaj ŝtormoj, precipe Kristnaske, la sonorilojn de la malfeliĉa urbo dronita.

Tiel naskiĝis la Lago de Grandlieu.
(Resumita kaj tradukita de S-ino POTIN).

La ekonomia vivo de la Princlando Monako

(Artikolo redaktita de Sinjoro Victor Pŕojetti, Financinspektoro, aprobita de la Ministro pri Financaj Aferoj. — Traduko de Sinjoro J. Derks, delegito de U.E.A. en Monako).

La Princlando Monako aspektas al multaj homoj kiel urbo senzorge lokita sur la sunplenaj bordoj de la Mediteraneo kaj sufiĉe divastigita opinio volas ke nia lando ricevis tiom da bonaĵoj de la naturo, ke la enloĝantoj havas facilan senzorgan vivon.

Kiom idilia estu tiu priskribo, la realeco diferencas iom de la ideo kiu kreĝis pri nia urbo, certe ne pri la alta vivnivelo kiu efektive ekzistas, sed pri la peroj kiuj ebligis atingi ĝin.

Riĉa je brila historia pasinteco, la monaka popolo konis jarmilon de ekonomiaj malfacilaĵoj kiuj akompanis la batalojn kaj la streĉojn de siaj Princoj por garantii la sendependecon de la teritorio kaj daŭrigi la dinastion de la Grimaldi. La konata sukceso, kies rezulto nuntempe pli bone mezuriĝas per la vido de riĉa kaj prospera urbo, ne permesas forgesi la seriozajn kaj longdaŭrajn streĉojn kiuj devis esti efektivigitaj en la pasinteco.

Antaŭ malpli ol jarcento la Princlando Monako estis nur komerca haveno kaj nur post la konstruo de la fervojo sur ĝia teritorio, kiu ĝin ligas al la aliaj regionoj, ekaperis ĝia vera alvokiteco.


Tiu ĉi alvoko estis la TURISMO kiu sendube plifaciligis la kreon de kazino kaj dumtempe estis organizita hotelan ilaron de unua rango.

Kion nekonatan diri pri la eksterordinara karniero de la plataĵo de la kaverno kiu iĝis « Montekarlo » kaj kies elradiĝo kreis la grandajn vintraĵn sezonojn en la komenco de la jarcento dum la fremda kaj riĉa klientaro kontribuis al ĝia elkonstruado kaj al tiu de la privilegiplena regiono kiu iĝis la Lazura Marbordo.

La socia evoluado, poste la eventoj de la lasta milito, iom konfuzigis la turisman strukturon de la Princlando sed ne en negativan direkton. Efektive, la socia evoluado ebligis la alvenon al Montekarlo de pli larĝaj turismaj klasoj, kies unua rezulto estis, ke la somero iĝis vera turisma sezono kiam antaŭ malpli ol dudek kvin jaroj oni povis diri, ke dum somero neniu estis en Montekarlo. La vintraĵ sezonoj ne konis malfavorajn sekvojn de ĉi tiu nova faktostato kaj se la cirkonstancoj estas tiaj ke oni ne plu instaladiĝas por pasigi monatojn kun sennombraj pakajoj, la monakaj palacoj akceptas dum la vintro fidelan klientaron, pli kaj pli nombran.

Ĉiti ciferojn estas teda sed ilia uzado estas ĉiam la plej bona demonstracio. Ni montros do ke dum la periodo de 1949 ĝis 1958 la turisma evoluado estas en konstanta pozitiva ekspansio. La nombro de turistalvenoj efektive plialtiĝis de 56.539 dum 1949 ĝis 95.286 dum 1958. Estas plialtiĝo de 68 %.

La turismo kreis ekonomion speciale favoran



Monte-Carlo. — La kazino kaj la terasoj

al la Princlando ĉar la progreso de ĉi tiu labor-branĉo multe kontribuis al la instalado de luksajaj komerceoj, nome parfumvendejoj, ledajkomerceoj, alt-klasaj virinbezonoj devigis la kreon en Montekarlo unue de monŝanĝejoj kaj poste de grandaj bankoj, pliparte filioj de la ĉefaj francaj, anglaj kaj italaj bankoj.

La facilajoj prezentataj de tiuj instalaĵoj kune kun la privilegia fiska reĝimo de la Princlando rapide estigas plian animadon al la monaka ekonomio. La unue sola turismo duobligis de financa ekspansio tiel ke la Princlando fariĝis hejmo de alilandaj kapitaloj kiuj, garantiitaj de la Princa suvereneco, malfermis novan vojon al ekonomia prospero.

Same kiel por la turismo, la eblecoj prezentataj en la financa kampo decidigis multajn alilandanojn restadi en Monako kreante en ĝi riĉecon de konsumado. La monaka administracio estas fiera rememorigi ke, malgraŭ la grandaj malfacilaĵoj kohataj en ŝiuj landoj, la enloĝantoj de la Princlando povis protekti siajn naĉiajn kaj alilandajn kapitalojn.

Pli freŝdata tria tendenco lokiĝas, rapide pliiĝanta en la monaka ekonomio. Tiu ĉi nova agemo naskiĝis de la kreado de multaj industriaj establoj pri diversaj branĉoj, laŭpove la tre malgrandan aeron de la Princlando. La kreado de tiuj industrioj, kvankam empiria, tamen rezultigis situacion kie larĝe plimultnombras la luksajaj industrioj kaj tiuj kiuj prilaboras la krudmaterialojn malgrand-volumajn.

Tiu ĉi situacio, fine de 1958, povas esti jene prezentata :

Industrioj	hemiaj	34 %
«	pri nutraĵoj	15 %
«	diversaj	12 %
«	pri teksaĵoj	12 %
«	pri precisaĵoj	11 %
«	pri mekanikaĵoj	9 %
«	poligrafiaj	7 %

Oni povas aldoni ke la hemiaj industrioj sumante la trionon de la monaka produkto, ĉefe estas fabrikoj de parfumoj kaj beligproduktoj, laboratorioj de apotekaĵoj kaj fabrikoj de plastaĵ objektoj.

Rilate la diversajn industriojn, tiuj pri teksaĵoj, precisaĵoj kaj la poligrafiaj, ilia aktiveco estas la fabrikado de juveloj kaj oraĵoj, virinvestaĵoj, vitraj objektoj kaj precizaj instrumentoj elekta materialo, k.t.p...

Kvankam la analizo de la rezultoj de la monaka industria aktiveco devus kalkuli je certa relativeco kun tiuj de la aliaj nacioj, estas interese atentigi pri la komparo de la indicoj de la produkta evoluado kun Francujo, surbaze de 1952 ili estas la jenaj :

	Francujo	Monako
1952	100	100
1960	160	278

Dotita de tri fontoj de ekonomia riĉeco, ĉi antaŭe priskribitaj, la Princlando daŭre streĉas por teni en ĉiuj la kondiĉojn de profitihava ekspansio al la alilandanoj kaj al la alilandanoj kiuj bonvolis enloĝadi.

Al ĉi lastaj, la Princlando estas feliĉa prezenti fervoran akcepton samtempe disponigante organizmojn administraciajn, ekonomiajn kaj politikajn de lando kies kontinueco, sub regado de siaj Princoj, estas la plej bela garantio.



EL IE EN LA MONDO

KIBUCO KOOPERATIVA VILAĜO EN ISRAELO

La grandan sopiron pri restarigo de hejmo por hebreoj en ilia malnova patrujo akompanis de ĝiaj unuaj tagoj la ideo pri denova ligiĝo al la patrinda tero. Sen plenumo de tiu ĉi kondiĉo ne estis eble ŝanĝi la nenormalan ekonomian strukturon de la hebrea popolo, forpelita antaŭ miljaroj el sia patrujo kaj forŝirita de siaj kampoj. Nur kiam la popolo estos organe ligita al la tero, kiam ĝi el tiu tero per propraj manoj akiros sian nutron, nur tiam ĝi havos fortajn radikojn kaj ĝia renaskiĝo estos daŭra.

La vojo al tiu celo renkontis tamen ŝajne nevenkeblajn obstaklojn. Preskaŭ du mil jarojn estis la lando Israelo neglektata kaj malaperis ĝia natura truktadono. De altaĵoj estis forlavita humo kaj iĝis de ili nudaj rokoj. La valojn kovris marĉoj, la ebenaĵoj ŝanĝiĝis en sablkovritajn dezertojn.

Malgraŭ ĉiu entuziasmo kaj persisto unuope oni apenaŭ povis venki tiujn malfacilaĵojn. Por atingi sian celon, decidigis la alvenintaj pioniroj formi grupojn, kies kunigita klopodo kaj reciproka interhelpo promesis sukceson. Grupo de laboristoj povis efektiviĝi vastajn projektojn, kiujn ne povis kuraĝi unuopulo. Kooperativaj labormetodoj altigis produktan kapablon. Ebligis konvena divido de taskoj kaj utiligo de malpli fortaj kaj malpli tertaj individuoj.

Tiel en komenco de nuna jarcento aperis ĉe hebreaj enmigrintoj en tiaman Palestinon la plano fondi terkulturajn establojn kooperativajn, en kiuj al nacia ideo aligis ideo de frata kumlaboro. Tiuj da ecoj kune ŝanĝis la alvenintajn komercistojn, studentojn kaj aliajn intelektulojn en kulturantojn de tero.

Tiamaniere estis fonditaj la unuaj kooperativaj vilaĝoj, la kibucoj, hebrej : kibuc = grupo. Ili meritis atenton de ĉiu, kiu interesiĝas pri socialaj problemoj de la nuntempo. Kibucoj estas terkulturaj vilaĝoj, kies loĝantoj kolektive produktas, ricevas nenian salajron por tiu laboro kaj kiuj akiras siajn bezonaĵojn, nenion pagante por ili. Membroj de kibuco ne posedas individuajn havaĵojn.

Oni tamen ne serĉu en kibucoj efektiviĝon de perfekta societo, ian socialan Utopion kun malesto de ĉiuj socialaj problemoj, societon sen iu aŭtoritato kaj sen neceso de kompromiso, sen postulo de disciplino aŭ mendisciplino. Tiuj ĉi kolektivaj komunumoj pravas, ke restas en sia eterna valido la diversaj problemoj, kiuj reaperas en diversaj formoj en ĉiuj homaj societoj harmonio inter postuloj de

la societo kaj inter la netuŝeblaj rajtoj de la individuo, neceso de gvido, rilato inter la ideologio kaj la societo. Kibucoj fariĝis komunumoj de homoj, unuigitaj per propravele akceptita disciplino kun klare difinitaj devoj kaj rajtoj.

Komenco de kibucoj estis regule tendoj aŭ primitivaj kabanaj en sabla aŭ roka dezerto, iam en marĉa regiono. Tia estis ankaŭ Degania, la unua kibuco, kiam ĝin fondis malgranda grupo de pioniroj.



Kibuco Bejt Alfa en 1927

roj en la jaro 1909 ĉe suda bordo de la lago Kineret (Tiberias). Nun ĝi estas aĝbla vilaĝo kun komfortaj loĝdomoj meze en verda kaj floroj kaj kun ĉio, kion postulas la nuntempa kulturo. Ĝi posedas fruktodonajn kampojn kaj plantejojn, plej modernajn agrikulturajn aranĝojn. Por atingi devis estis venkitaj ĉiuspecaj malfacilaĵoj, kiuj ofte ŝajnis superi homajn fortojn. Similan sperton renkonten al sukceso, veninta pli aŭ malpli frue, trapasis ankaŭ la ceteraj kibucoj, da kiuj estas hodiaŭ 228 kun suma loĝantaro de pli ol 85.000 homoj, kiuj kulturas pli ol 1 1/2 milionon da dunamoj (1 dunam = 100 kv. metroj) de tero. En 1948, kiam fondiĝis ŝtato Israelo, estis tiuj nombroj : 138-67.000-1.000.000.

Kvankam membraro de ĉiuj kibucoj reprezentas malpli ol 5 % de la loĝantaro Israela, superas ilia influo grave tiun proporcion. Ne nur per siaj atingoj (trionon de la agrikulturaj produktoj de Israelo

liberas kibucoj) sed ankaŭ per preparo de multnombraj pioniraj laboroj ekonomiaj kaj socialaj.

La tero de la kibucoj apartenas al la nacio, por ebligi ekloĝon kaj eklaboron, speciala organizo provizas nun al novaj fondaĵoj longjarajn pruntojn. La laborojn plenumas ĉiuj maturaj membroj. Plejparto de la taskoj en hejma mastrumo estas prizorgata en komunaj entreprenoj (infanaj domoj, kuireroj, lavejoj, ktp., kun novtempa ekipoj) ja ĉefe per virinoj, sed ĝi postulas nemulte da homa forto. Tial la virinoj partoprenas krome multajn aliajn laborojn en la kibuco ĉe flanko de viroj, tamen trovante por si di-

versajn taskojn, speciale por ili konvenajn. Ĉar principe estas postulata vivteno per propraj fortoj, oni evitas kaj nur tute escepte aplikas salajratan laboron de homoj, starantaj ekster la kibuco.

(daŭrigota).

Ota GINZ, Kirjat Jam.

(Traduko en nacian lingvon kaj publikigo estos bonvenata. S-o O. Ginz, Shikun Agash 30/8, Kirjat Jam Bet, Israelo, estos danka por alsendo de 2-3 ekz. de la publikaĵo.)

La Urugvajanoj kaj la futbalo



La omnibusoj ne ekhaltas. Ili iras plenegaj de personoj. El ĉiu loko. Kio okazas? Kien ili iras? Estas kompreneble: hodiaŭ konkuras « Peharol » kontraŭ « Nacional », la du ĉiamaj, klasikaj kontraŭuloj en la urugva-futbalo, kaj ĉiu « bona » urugvajano, kiu sin konsideru tia, devas ĉeesti la okazadon.

Fakte estas tiamaniere. Ĉiu urugvajano estas sperta futbalkonanto. Se vi alparolas al iuj ajn, kiuj post maĉo grava estas interparolantaj, vi povu esti certa, ke ili parolas pri tiu evento.

La futbalo estas sporto enkondukita en la landon antaŭ 50-60 jaroj, de anglaj fervojistoj, kiuj establis la nacian fervojan reton. La landanoj baldaŭ lernis ĝin, kaj fariĝis lertaj ludantoj. Kiam okaze de la Olimpiaj Ludoj en Kolombes, 1924, oni eksciis ke Urugvajo estis gajninta la ĉampionecon de futbalo, multaj personoj devis konsulti mapojn por trovi tiun tiam enkonatan landon sur la mondaj kontinentoj. Vere, estas tre eble, ke la futbalo estas kio pli faras por diskonigi la landon eksterlande.

Tiu vera sporta sukceso estis poste konfirmata per la gajno de la Olimpia Ĉampioneco de 1928, en Amsterdamo, la Monda Ĉampioneco de 1930 en Montevideo mem, kaj fine en 1950 en Maracana, antaŭ 200.000 brazilanoj, kiuj surprizite, vidis kiamaniere sia teamo perdis la trofeon « Jules Rimet », jam konsideritan propra. Efektive, perdinta 1-0, Urugvajo egalas la golregistrlon, kaj mankante nur 6 minutoj faris novan golon, donante al la teamo pluan ĉampionecon.

Post 1954 okazis multaj aferoj. Unue, la naciaj futbalaj kluboj vendis kelkajn el la plej bonaj futbolistoj al eksterlandaj teamoj. Due, la urugvajanoj tiom konfidis en sia futbala supereco, ke ili malatentis multajn gravajn detalojn.

Je la Monda Ĉampioneco de 1954, la urugvajanoj teamo aliris Svislandon la unua. Antaŭe, ĝi ludis plurajn maĉojn kun eŭropaj teamoj por kutimigi siajn ludantojn en la lokaj teknikoj, kaj venkinte ĉe ili, ĝi nur pensis venki la hungaran teamon, kiu estis tiam la plej timinda kontraŭulo. Efektive, la hungaroj gajnis al Urugvajo 4-2 kiam finiĝis la maĉo, post plidaŭrigo de la ludado pro la egaleco en la golregistrlilo 2-2. Tiamaniere la teamo unufoje perdis mondan ĉampionecon en kiu ĝi partoprenis.

Poste, la malvenko estis kompleta kaj bruiga: en 1958 Urugvajo ne povis partopreni en la tiujara Mondĉampioneco, ĉar ĝi malsukcesis frue en la regionaj klasifikaj maĉoj!

Kvankam ŝajne la futbalo en Urugvajo, post apogeo dum 1950, estas faliinta malsupren, la urugvajano vole-nevole ne konscias ĉi tiun evidentan veron. Li sin tenas je sia proferata temo... ĉiam li kulpigas al iu pri la malsukceso, kaj tuj, kvazaŭ sperta futbalteknikisto, li donas multajn solvojn por eviti estontajn similajn fiaskojn.

Dum futbalmaĉo en Urugvajo, estas eble sperti la plej diversajn okazintaĵojn. Ne estas malofte vidi verajn batalojn inter partianoj de kontraŭaj teamoj: kelkefoje la urugvajano fanatikiga pro tiel banala kaŭzo, kaj tiam la maĉo finiĝas kun tre malagrablaj sekvoj.

Urugvajo havas tre bonajn rilatojn kun siaj du grandaj najbaroj: Argentino kaj Brazilo. La urugvajanoj konsideras argentinanojn kaj brazilanojn veraj fratoj. La rilatoj ĉiam estis bonegaj kaj fratcaj... ĝis iliaj futbalteamoj konkuras. Tiam la amikeco finiĝas. Ŝajnas ke la partianoj kredas ke kriante kaj insultante la « malamikojn », ili pli facile sukcesigos sian teamon. Neniam mankas pugnobato inter ludantoj kaj ĉeestantoj, kaj iam eĉ devis interveni diplomatia aŭtoritato por solvi iun gravan aferon kaŭze de futbalmaĉo...

Sed... mi devas fini, ĉar hodiaŭ konkuras « Peharol » kaj « Nacional », kaj ankaŭ mi deziras vidi la maĉon.

Alberto BARROCAS, el Urugvajo.

Noto. — Peharol (Penjarol) kaj Nacional (Nasional) estas la du plej prestigaj kaj de la publiko satataj futbalkluboj en Urugvajo.

Tra la Esperanta literaturo

A. KOFMAN

En la « Enciklopedio » Julio Baghy prezentis Kofman jene :

Ruso, librotenisto en Odessa (Rusujo) estis unu el la eminentaj E-poetoj kaj artradukistoj de la unua periodo (1892-1906). Li verkis originale poemojn kaj tradukis la dramon « Kaïn » de Byron, parton de « Iliado » kaj partojn el « Faust » de Goethe. La du unuaj aperis en libroformo, la lasta troviĝas en malnova jarkolekto de Lingvo Internacia. Liaj stilo kaj tradukmaniero distingigas per arta simpleco kaj viva klareco.

Lia pionira laboro meritas atenton de la posteuloj. En la komenca periodo de la literatura lingvo li vekis admiron per sia esprimkapablo. En 1896, li planis aperigi poemaron, tradukitan de li el 18 lingvoj. La reformema ondo lin forportis en la tendaron de la idistoj, (poste li iĝis Okcidentalista), tamen liaj postlasitaj verkoj kaj tiama lingvokulturo restas rimarkindaj.

— o — o — o — o —

Honore al la centjara datreveno de la rusa verkisto Anton Cekov ni prezentas tradukon de malloga rakonto de la rusa aŭtoro farita de A. Kofman.

LA MORTO DE OFICISTO (A. Cekov)

Belan vesperon en la teatro sidis la tribunalo-ficisto Ivan Dmitriĉ Vermulo kaj rigardis de ldua seĝovico, per binoklo, la « Sonorilojn de Corneville ». Li rigardis kaj sentis sin sur la supro de l'felio. Subite (en rakontoj oni ofte trovas tiun ĉi, « sed subite », kaj la verkistoj estas pravaĵ : la vivo estas plena je subitaĵoj !). Subite lia vizaĝo ricevis sulkon, l'okuloj ruliĝis supren, la spiro haltis... Li demetis la binoklon de l'okuloj, mallevigis kaj — pĉi ! — ekternis. La terno ne estas malpermesata : vilaganoj, poliestroj kaj iam eĉ konsilistoj de ŝtato, ĉiuj ternas. Tial Vermulo sentis nenian konfuzon, devis sin per la poŝtuko kaj, en kvalito de ĝentilulo, ĉirkaŭrigardis por vidi ĉu li iun ne maltrankviligis per la terno ? Sed nun la konfuzo lin prenis. Li rimarkis ke la maljunulo, sidante antaŭ li, en l'unua seĝovico, diligente viŝis sian senharajon kaj la kolon per la ganto kaj ion murmuris. Vermulo rekonis la maljunulon : tio ĉi estis generalo Brijalov, servinta en la ministraro de vojkonstruo.

— Mi ŝprucis sur lin ! ekpensis Vermulo. Li certe ne apartenas al mia estraron, tamen estas malkonvene. Mi devas peti pardonon.

Vermulo ektusis, antaŭigis la korpon kaj murmuris al l'orelo de l'generalo :

— Pardonu, via generala moŝto, mi ŝprucis sur vin... senintence.

— Ne maltrankviliĝu, bagatelo...

— Je Dio, pardonu. Mi ja sen intenco...

— Ha, trankviliĝu min vin petas. Ni aŭdu plue !

Vermulo konfuziĝis, malsaĝe ekridetis kaj komencis rigardi la scenon. Rigardante li plu ne sentis sin feliĉa. Li estis kaptita de maltrankvilo. En l'interakto li aliris al la generalo, faris kelkajn paŝojn ĉirkaŭ li kaj, preminte sian timecon, ekmurmetis :

— Mi ŝprucis sur vin, via generala moŝto... Pardonu... Mi ja sen intenco...

— Ha, kion vi diras ! mi jam delonge forgesis, kaj vi ĉiam ripetas la samon ! diris la generalo kaj faris per la suba lipo moveton de malspacienco.

— Hm, li forgesis, sed l'okuloj konservas malicon, pensis Vermulo, rigardante suspekto la generalon. Li ne volas eĉ paroli. Mi devas klarigi al li, ke mi tute ne volas fari tion ĉi... Ke tio ĉi estas lego de l'naturo... alie li povas opini ke mi volis kraĉi sur lin... kaj se li ne pensas tion ĉi nune, li ĝin pensos poste...

(Vermulo, denove, vizitas dufoje la generalon por peti pardonon, ĉar li opinias, ke la generalo ne sufiĉe serioze konsideras lian bedaŭron. Sed la duan fojon...).

— For el tie ĉi... !!! ekkriegis la generalo bluginta kaj tremeginta.

— Ki... Kiel ? ekdemandetis Vermulo, falinte en teruron.

— For el tie ĉi ! ripetis la generalo, frapante piede la plankon.

En l'internaĵo de Vermulo io ŝirigiĝis. Nenion vidante antaŭ si, nenion aŭdante li aliris kankre al la pordo, direktiĝis al la strato kaj iris domen, kiel automato. Tie, ne devestinte l'uniformon, li kuŝiĝis sur la kanapon kaj... mortis.

(el la rusa tradukis Kofman).

Lingvo Internacia 1903-1905.

FANTAZIAĴOJ

Mahlzeit kaj Zaturek

Mi interkonatiĝis kun mia kara, pola verkistokolego restadanta en Budapeŝt, kiu rakontis al mi la suban historion.

Lia samlandano — laŭnome « Zaturek » — pasintjare estis en Berlino. Kiel modesta vojaĝanto, antaŭ ĉio li serĉis polan pensionon por farti hejme ĉiuvespere. Tage li sole promenadis en la urbo, vizitis la muzeojn kaj rigardis la tutan fremdecon, kies ĉarmon ne malpliigis, sed pligrandigis por li tiu fakto, ke li eĉ unu vorton ne parolis germane kaj pro tio li estis devigata je la primitiva interkomunikado de Robinson kaj Vendredo.

Por la tagmanĝo li elektis modestan, malrandan restoracion. Ĉe la alia flanko de la tablo sidis germana maljunulo, kiu havis amikeman vizaĝon.

Silente ili tagmanĝis. La germano finis la tagmanĝon unu minuton pli frue, li ekstaris, klinis facilmove sian kapon kaj diris : « Mahlzeit ».

Ankaŭ nia polo ekstaris, pensinte, se tiu germano estas tiel ĝentila kaj sin prezentas en publika restoracio, ankaŭ li ne devas esti malafabla.

Zaturek — prezentis sin la polo.

Sekvantan tagon li trovis denove la germanon ĉe la sama tablo. Ili kune tagmanĝis. La germano refoje unu minuton pli frue ekstaris, ekbalancis la kapon kaj diris :

« Mahlzeit ».

Zaturek iomete miris, ĉu la germano forĝis ke hieraŭ ili jam prezentis sin reciproke, aŭ ĉu ĉi tie estas tia kutimo, ke oni devas je

ĉiu okazo plurfoje sin prezenti. Do, li konformiĝis al la kutimo, ankaŭ li ekstaris kaj diris : « Zaturek ».

Kiam ĉi tiu sceno jam triafoje okazis, vespere en la pensiono, li menciis al siaj samlandanoj ĉi tiun strangan, germanan kutimon kaj demandis, ĉu ili opinias ke Sinjoro Mahlzeit estas ordinara germana tipo, aŭ ia ekstravaganculo. Kompreneble elkore ili priridis kaj informis lin ke « Mahlzeit » ne estas nomo, sde ĝentila esprimo, kiel « Bonan tagon » aŭ « Mi havas la honoron ». La germana sinjoro tute simple deziris je lia sano la tagmanĝon.

Nia polo tre hontis pri sia senkultureco — ruĝiĝis pro la penso : kion pensas pri li la germano, kiu havas sendube eŭropan kulturon.

Tagmeze li jam eniris ĝustatempe en la restoracion. Eksciinte kaj rapide tagmanĝis nia polo intence li konkuris kun la germano kaj nun li sukcesis fini la tagmanĝon du minutojn pli frue. Tiam li ekstaris, klinis sian kapon kaj triumfe, supreme kaj nobele diris :

« Mahlzeit ».

Nun la germano ruĝiĝis iomete. Evidente pro la ĝojo, ke ĉi tiu polo tre inteligenta viro estas, ĉar post mallonga konateco li honoras lin kun la kutima saluto en la gepatra lingvo de la lando. Kiel bona kozmopolito, li volis tuj montri ke ankaŭ li scias : kio estas la internacia komplezemo. Ankaŭ la germano ekstaris, klinis sin kaj kun tolerable bona prononco, ridetante ripetis la lernitan vorton :

« Zaturek ».

F. KARINTHY

El hungara tradukis : D-ro I. Nagy.

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO 1960 - 61

(2a parto - Legu la regularon en la antaŭa numero)

Ni ricevis multajn respondojn al niaj problemoj proponitaj en la lasta numero. Ni esperas, ke ĉiuj bonvolos daŭrigi la konkurson respondante la du jenajn problemojn (Respondu antaŭ la 15-a de Januaro, mi petas, kaj zorge skribu viajn nomojn (ĉu S-ro, ĉu S-ino, ĉu F-ino) kaj adresojn. Kaj nun! Gajnu la plej kleraj!

1-a Problemo

Anstataŭigu la punktojn per la taŭgaj vortoj (unu poento por ĉiu vorto korekte trovita).

— LA OMBRO DE LA AZENO —

Iun tagon, kiam Demosteno, de la alto de la tribuno, provis alitiri la atenton de la Atena popolo al gravaj demandoj, li ne sukcesis aŭskultigi sin. Li havis la ideon komenci la sekvantan reciton: « Junulo estis luinta azenon por iri de Ateno al Megaro. Estis somera tago: ĝaja tagmezo, kiam la suno brulis per sia plena forto, la mastro de la azeno kaj la vojaĝanto haltis kaj disputis pri tio, kiu profitus el la ombro, kiun donis la korpo de la besto.

— Mi luigis al vi mian azenon, kaj ne ĝia ombro, diris la unua.

— Ne, kontraŭdiris la alia, mi faris negocon pri la tuta besto. »

En tiu momento Demosteno interrompis sin, kaj la amaso, vive interesita, postulis per laŭtaj krioj la daŭrigon kaj la finon de la historio.

« Nu, kio! ekkriis tiam Demosteno, la ombro de la azeno interesas vin tiagrade, kaj, kiam mi parolas al vi pri viaj plejpropraj interesoj, vi nur konsentas min aŭskulti! »

La Atenanoj komprenis la lecionon, sed neniam ekscis la finon de la historieto.

2-a Problemo

KASITA FRAZO

1) kanoto — 2) perko — 3) barako — 4) ŝarko — 5) velki — 6) borilo — 7) kresto — 8) kranio — 9) sulko — 10) koliko — 11) falci — 12) bireto — 13) saluti — 14) planto — 15) premi — 16) Maroko — 17) trono — 18) glando — 19) orelo — 20) plendi — 21) mastro — 22) borado — 23) falko — 24) lifto — 25) planedo — 26) terni — 27) kampo — 28) konato — 29) struto.

Elprenu el ĉiu supra vorto unu literon tiel, ke la restintaj literoj, lasitaj en siaj antaŭaj lokoj,

formu novan vorton. La elprenitaj 29 literoj en la numerita vico formas malnovan proverbon, kies pravecon pruvas multegaj spertoj.

Amuzaj problemoj

(de S-ro Jarlier)

Solve de la 4a problemo de Numero 4 :

La divido de vino.

La jena tabulo montras la necesajn manipulojn.

Oni nomas A la botelegon (12 litroj), B la botelon (7 litroj) kaj C la boteleton (5 litroj).

	A	B	C
1 Botelo A plena de vino	12	0	0
2 Oni plenigis C el A	7	0	5
3 Oni verŝas C en B	7	5	0
4 Oni plenigas C el A	2	5	5
5 Oni plenigas B el C	2	7	3
6 Oni verŝas B en A	9	0	3
7 Oni verŝas C en B	9	3	0
8 Oni plenigas C el A	4	3	5
9 Oni plenigas B el C	4	7	1
10 Oni verŝas B en A	11	0	1
11 Oni verŝas C en B	11	1	0
12 Oni plenigas C el A	6	1	5
13 Oni verŝas C en B	6	6	0

— Necesas 13 manipulojn kaj kun la neeviteblaj perdoj de vino.

Por eviti tion, oni povas verŝi 6 litrojn okulmezure!

Novaj problemoj

La tajloro. — Tajloro havas pecon de drapo, 12 metroj longa. Ĉiutage li tondas 2 metrojn. Post kiom da tagoj la peco de drapo estos tute tondita?

La tri ludantoj. — Tri ludantoj A, B, C konsentas, ke la malgajnanto de ĉiu ludbatalo duobligos la monon de la aliaj ludantoj. A malgajnas la unuan batalon, B la duan kaj C la trian. En la fino ĉiu posedas 16 frankojn. Kiom da nomo posedis ĉiu ludanto antaŭ la komenco de la ludo?

Le Gérant : H. MICARD

IMP. COCONNIER, SABLÉ

LA JUNAJ

DETEKTIVOJ

ILUSTRITA RESUMO DE LA NOVELO DE J.H. SULLIVAN


(4-a parto)




Post longa marŝado, la viro kaj Andreo alvenis en Svenburg, trans la limo. La viro, Helmo, kondukis la knabon en malgrandan ĉambron. La fenestro trovigis alte en la muro.



Kiam Andreo vekigis, li pensis pri Lizbeto : « Kion ŝi faris ? Kion ŝi diris al Onklo ? » Helmo alportis teleron : « Jen via matenmanĝo », kaj denove li ŝlosis la pordon.



« Mi deziras tason ! » kriis Andreo, frapante la pordon per la manoj. Helmo venis kun vipo, kaj frapis lin. « Se mi aŭdos denove bruon de vi, mi vibatos vin ĝis vi estos preskaŭ senviva ! » li diris.



Silente Andreo movis ŝecon kaj metis ĝin sub la fenestro. La strato estis je distanco de dek metroj sube ! Plue la knabo povis nur parte malfermi la fenestron.



Du policistoj iris de domo al domo. Rapide Andreo prenis el sia poŝo pecon de papero kaj krajonon. Li skribis : « Helpu ! Mallibera ! » kaj jetis la paperon tra la malfermita parto de la fenestro.



La policistoj trovis la paperon. Post duonhoroda senpacienca atentado, Andreo aŭdis la voĉon de Helmo : « Bone se vi scias, ke li estas tie, vi eniru. Sed mi perdis la ŝlosilon ! »

(Represita kun permeso de la aŭtoro kaj de la eldonistoj de « La Junaj Detektivoj ». La libro (43-a paĝa novelo kun 9 ilustraĵoj de Brenda Goodwin) estas aĉetebla ĉe Esperantaj Libroservoj, aŭ rekte ĉe la eldonistoj, The Esperanto Publishing Company Ltd., 100 Long Lane, Rickmansworth, Herts. Anglujo, po 4 int. respondkuponoj.)

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (20 aŭst. ŝil.).

Belgujo : F-ino S. Obozinski, avenue Brugmann 364, BRUXELLES 18.

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (6 ŝil.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (2,5 guld.).

Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33 (3 mark.).

Germanujo (DDR) : S-ro Ernst Mutschall, 19a HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (5 mark.).

Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (40 pes.).

Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (450 liroj).
Itala Esperanto-Federacio, Corso G. Galilei, 22, TORINO.

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (6 kr.).


Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago K (6 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (30 Zlotoj).

Svedujo : S-ro Rune Palmgren, Persikogatan 32 III, Stockholm-VALLINGBY (4 kron.).

Svislando : S-ro Pierre Metivier, Via Ferrera, Ascona (Tes.) (3 sv. Frank.).

Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (11 st.), aŭ respondkuponoj (8 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGE
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiutagajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncintajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGE (Maine-et-Loire) Francujo